

Nia kvaronjarcenta esperantisteco, 6-a parto
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 742, 1977.12.28 & 30 & 31

Cl.- Parolas Claude Gacond.

En 1952, tio estas antaŭ ekzakte 25 jaroj, mi komencis praktiki esperanton. Por iel marki tiun ĉi personan eventon, mi sentis min foje rajtigita paroli pri mi mem. Dum serio de prelegoj mi prezentis kelkajn aŭtobiografiajn rememorojn. Tiun ĉi serion mi konkludas hodiaŭ parolante pri mia nuna aktiveco plene deciĉita al la iompostioma starigo de kultura centro.

Dum mi oficis kiel sekretario de la asocio Esperanto-Edukistaro de Svislando, mi pli kaj pli konvinkiĝis, ke la stukturoj mem de la esperanto-movado kaŭzas la stagnadon de la zamenhofa lingvo. Ili tro reliefigas certajn karakteritaĵojn, kiuj eble estis necesaj en la komenco de la disvolviĝo de esperanto, sed kiuj nun malfavoras kulturen progreson.

Mi min klare esprimu. Socialogia karakterizaĵo de la esperantistaro estas ties emo al absoluta egaleco, al egaligo eĉ. Eĉ la lingvokono ne estas kriterio necesa por elektiĝi al ĉeffunkcioj. Kulture la esperantistaro ne facile akceptas la ideon de elita hierarkio, ĝi eĉ emas malagnoski rajton aŭ privilegion al la elituloj, fermante sin al ilia influo. Pro tio la kleruloj izoliĝas en personaj serĉadoj aŭ fermitaj rondoj. Okupiĝante pri la instruado de esperanto, mi konstatis, ke la laboro de gravaj pedagogoj kiel Pierre Bovet, Adolphe Ferrière, Charles Baudoin, restis nekonata malgraŭ la ekzisto de raportoj kaj verkoj en esperanto. La organoj mem de niaj lokaj kaj naciaj organizaĵoj restis fermitaj al ili, kiel ili restas fermitaj al la plej talentaj verkistoj.

Mi konvinkiĝis, ke por plibonigi tiun ĉi situacion, estas nepre necese starigi ion novan, kiu nenion detruu, sed alportu novan dimension al la Esperanto-movado. Tiel naskiĝis en 1968 Kultura Centro Esperantista, kiel transformo de Esperanto-Edukistaro de Svislando. Ni celis la kreon de institucio, kie oni ĉesu rigardi horizontale kaj komencu kunlabore kleriĝi kaj kultivi sin reciproke.

Mi tuj rimarkis, ke multaj aliaj esperantistoj sentis la saman bezonon rigardi supren kaj flegi literaturon kaj sciencon. Ofte el foraj landoj ili venis por esprimi sian kunlaboron kaj Kultura Centro Esperantista tute kontentige kreskis. Jam ses jarojn poste ni sentis la bezonon enradikiĝi en preciza loko. Ni estis rimarkintaj, ke en la urbo La Chaux-de-Fonds ĝi trovis la serĉitan fekundan grundon. En aro da prelegoj ni havas la okazon raporti pri la originala spirito de la avangardisma loĝantaro de la montaro Ĵuraso, kaj precipe de la neŭsatela altaĵo. Tie la kamparanoj estis horloĝistoj dum la vintro, kaj iliaj riĉaj domoj respegulas klerecon kaj sendependecon. La ĉefurbo de la horloĝ-fabrikado konservis avangardan spiriton kaj ni tuj sentis, ke en ĝi Kultura Centro Esperantista estos vere hejme.

Ekde 1974 mi komencis ne nur instali la sekretariejon de KCE en La Chaux-de-Fonds. Mi ankaŭ iniciatis aron da agadoj. La kulturaj semajnfinoj, kiujn mi organizis, montriĝis tre sukcesaj. Ili permesis al verkistoj, sciencistoj, edukistoj renkontiĝi kun studemaj esperantistoj. Ĉiuj ekkonsciis pri la vera valoro de la zamenhofa lingvo. Por ke tiuj ĉi manifestacioj fariĝu malpli efemeraj, mi aperigis la unuajn kajerojn de la kolekto *Studoj*. En 1975 mi sentis, ke la agado estis nun sufiĉe matura, por ke longdaŭraj kursoj feriaj ekkazu. La unua estis dusemajna kurso pri la tradukarto, kiun gvidis la tradukisto kaj verkisto Claude Piron. Tiel naskiĝis Internacia FERIA Altlernejo. Samtempe diskutiĝis la fondo de gastejo, kiu ricevis la nomon de la pioniro Edmond Privat, fondinto de la unua Somera Universitato en 1925.

Mia rolo pli kaj pli identiĝis kun tiu de kunordiganto. En la kadro de ĉiu agado mi restis inicianto, ĝis kiam mi trovis kunlaborantojn, kiuj iom post iom transprenis la komencitan laboron. Tiam mia tasko estas forlasi la gvidilojn, metante ilin en manojn pli kompetentajn ol la miaj. Per tio mi emas marki mian deziron, ke en la aktiveco de KCE regu hierarkio bazita sur la profesiaj konoj kaj sur la talentoj.

Sed tio ne signifas, ke mi rompis kun la originala egaliga sinteno propra al la esperantismo. Nia elitismo restas demokrata. La starigata Internacia FERIA Altlernejo volas esti ĉies universitato. Per sia ekstera aspekto la organoj *Monata Cirkulero* kaj *Studoj* provas pruvi, ke ne la presrimedo gravas, sed la enhavo. La kvalito estas io interna, ne tuj perceptebla.

Kun la nova jaro 1978 Kultura Centro Esperantista eniras sian dekan vivjaron. Ĝin ni havas la privilegion festi per la aĉeto de du domoj, kie ni jam okupas kvar loĝejojn. Mi ne dubas, ke tiu ĉi aĉeto firmigos la komencitan laboron. Kvin aliajn domojn ni aĉetos dum la sekvantaj jaroj. Tiel tuta kvartalo estos je la dispoŝo de la studemaj esperantistoj.

Dum deko da jaroj mi fakte donis mian tutan tempon kaj mian kompletan energion al la ĵus priskribita laboro. Mia vivo estas tre intime ligita al ĝi. Tamen mi sentas, ke mia agado estos plene sukcesa, nur se ĝi kapablos daŭrigi sen mi.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !